

Hermann Löns,

## Aŭdu

*tradukita de Manfred Retzlaff*

Senviva estas en la mond'  
Nenio, ankaŭ la  
Dezerta seka sablo kaj  
La roko vivas ja.

Malfermu la okulojn, sed  
Senvorta tenu vin.  
Sekretaj aĵoj tiam al  
Vi eksciigos sin.

Komprenos vi la voĉojn de l'  
Estaĵoj ĉirkaŭ vi.  
Kaj ĉiu sonos, kvazaŭ vin  
Salutos kore ĝi.

*Traduko de la Germana poemo "Höret" de HERMANN LÖNS (\*1866-08-29 – †1914-09-26) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (\*1938-11-04).*

*Arg-621-1255 (2012-10-29 22:20:12)*